

Al la loĝantoj de urboj nomitaj laŭ Zamenhof,

Estimata sinjorino, sinjoro,

Vi loĝas en strato nomita laŭ dr.o L.L. Zamenhof. Ĉu vi scias kiu li estas? Kial oni donis lian nomon al stratoj? La informoj en tiu ĉi letero eble ankaŭ por vi estas interesaj.

Kial ni skribas ĉi tiun leteron? 2009 estas Zamenhofa jaro.

Je la 15a de decembro antaŭ 150 jaroj Zamenhof naskiĝis en Bjalistoko en la orienta parto de Pollando, apud la nuna limo kun Ruslando. En tiu urbo vivis Germanoj, Rusoj, Judoj, Poloj kaj aliaj homoj, ĉiuj parolantaj diversajn gepatrajn lingvojn. Ĉar ili ne povis kompreni unu la alian multaj miskomprenoj kaj konfliktoj ekestis. La juna Zamenhof volis trovi solvon por tio. Li inventis dum siaj mezgradaj lernejoj internacian lingvon. Se homoj povus paroli unu kun la alia, ili povus ankaŭ vivi kune en paco. Ankaŭ en la cetero de la mondo tiel finiĝus militoj kaj aliaj problemoj kaŭzigitaj pro lingva diverseco. Li ekstudis kaj fariĝis okulkuracisto. Li ne multe perlaboris en sia profesio ĉar li sentis sin ligita al la sorto de malriĉaj pacientoj. Tamen li persistis en sia elektita vojo. Li kapablis eldoni en 1887 libreton en 6 lingvoj kun la gramatiko de sia Internacia Lingvo. Ĝi ekhavis sukceson. En 1887 nur unu persono konis la lingvon, sed jam en 1905 okazis mondkongreso en Boulonjo ĉe Maro. La lingvo disfamiĝis kiel Esperanto. Esperanto estis la pseŭdonimo de Zamenhof. Ĝi signifas: tiu, kiu esperas.

En la Zamenhofjaro 2009 la 93a Mondkongreso okazos en la naskiĝurbo de Zamenhof. Kelkmiloj da homoj kunvenos tie kaj sen interpretistoj ĝuos ekskursojn, prelegojn, artprezentojn kaj transliman amikecon.

Esperanto Nederland volas per ĉi tiu letero peti atenton por Zamenhof, Esperanto kaj la ideo malantaŭ ĉi tiu lingvo: interkompreniĝo inter homoj kiu parolas diversajn lingvojn. Li ideo ke per tio oni povos meti finon al militoj eble estas naiva, sed nenio malbona estas pri la ideo de pli bona interkompreno inter homoj.

Kial Esperanto kaj ne la angla, franca, hispana, rusa, araba, ĉina aŭ unu el la aliaj 6000 lingvoj? Esperanto estas planita kiel internacia lingvo. Tial la gramatiko estas simpla kaj sen esceptoj; estas nur 12 verbaj formoj (en aliaj lingvoj miloj da), la vortformado estas kreiva. Vortoj estas prononcataj kiel oni skribas ilin. La plej grava afero estas ke ĝi estas neŭtrala kaj ne ligita al iu ŝtato, religio aŭ politika grupo. Kie aliaj lingvoj ofte estas uzataj por disigi homojn, la nura celo de Esperanto estas ligi homojn. Oni diras foje ke Esperanto estas la sola lingvo al kiu ne gluiĝas sango.

Ĉu vi volas scii pli pri Zamenhof kaj lia ideo Esperanto? Feliĉe ni povas direkti vin al interreto. Pli ol 40 milionoj da referencoj en Guglo estas disponeblaj pri Esperanto. Por doni al vi impreson pri la lingvo "de via strato", ni ĉi kune enmetis paĝindikilon por libro kaj koncizan gramatikon de Esperanto. Per iom da bonvolo, vi povos paroli buŝplenen da Esperanto antaŭ la komenciĝo de la speciala kongreso kiu ekas je la 25a de julio. Fariĝu mondcivitano, lernu Esperanton. Vi ne bedaŭros. Ni volonte sendos pli detalajn informojn al vi.

Dankon pro la atento kaj multe da loĝplezuro en via Zamenhofstrato.  
Nome de Esperanto Nederland,

Ineke Emmelkamp, estrarano pri informado  
Arubastraat 12, NL 9715 RW Groningen  
tel: +31 50-5718842  
[www.esperanto-info.nl](http://www.esperanto-info.nl)  
rete: [info@esperanto-info.nl](mailto:info@esperanto-info.nl)

Joke Hoobroeckx, informada K-iono  
Marquettelaan 33  
NL 1964 JR Heemskerk  
tel: +31 251 232155  
rete: [hbx@freeler.nl](mailto:hbx@freeler.nl)